


DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

* dumonata kristana revuo en esperanto * n-ro 6 (861) * 2006 *



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,

FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33 (0) 549468021;

✉ keli@chez.com

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4,

NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;

☎ +31 1724 20222;

✉ e.a.vandijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Claudiusweg 10,

DE 74074 Heilbronn, Germanio;

☎ +49 7131 162688;

✉ SLKrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- * Membro-subtenanto €30,- * Nura abono:
pagante rekte al KELI €16,- * pagante al Libroservo
€18,- * Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita
letero al la kasisto de KELI. * Se estas en via lando
UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu
prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI *
Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Storgatan 6 A; S 153 30 Järna; Svedio;

☎ +46 (70) 2004574;

✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel Polnický; Na Vinici 110/10

✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;

☎ +420 325 615 651;

✉ Cea.polnicky@quick.cz

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

ENHAVO

Ni bezonas unu la alian	127
Evangelio laŭ Tomaso	129
Neimageblaj sablaj skulptaĵoj	132
Pri la beata maljuna monaĥo Johano el la vilaĝo Olenevka	134
Sur la ŝtupoj de la Dia Domo	136
Kio estas la familio. Prediko dum BET-42	137
Klasika amo	140
Nova Biblio – germanlingva	141
Raporto de la KELI-jarkunveno	142
Reagoj al artikolo - tur-kokoj	145
Informetoj	146
Nekrologoj	147
Ŝalom – kanteto	148

REDAKTORAJ VORTOJ

Kiam mi nun sendas la Dia Regno-n
al la presejo, jam estas la dua dimanĉo
de Advento. Ĉi-jare mi ne havas ar-
tikolon kiu temas pri Kristnasko. Sed
mi havas artikolojn kiuj iel montras la
rezulton de Lia alveno. Temas pri amo
aŭ rilatoj inter ni homoj aŭ nia rilato
kun Dio baze de nia kredo. Sekvont-
somere la kongreso temos pri la Dia
amo. Se vi havas iajn pensojn pri tiu
temo, mi volonte publikigos ilin. Ĉiu-
tagaj pensoj aŭ pli teologiaj, ne gra-
vas. Tiuj pensoj povas funkcii kiel
preparo al tiuj kiuj kongresos en Pol-
lando.

Multaj kiuj renkontis min kaj mian
edzinon dum la ĉi-jara kongreso scias
ke ni atendis bebon. Kun granda ĝojo
mi povas informi vin ke nia filo
naskiĝis sane la 4-an de oktobro. Liaj
ridetoj, “paroloj” kaj aktiva intereso pri
la mondo donas multe da ĝojo al ni. Ĉu
ekzistas pli granda donaco?

Ni bezonas unu la alian

Jaques TUINDER, NL

Mi estas konvinkita pri tio, ke homoj estas kreitaj por La Bono. Ke La Malbono estas escepto, kaj La Bonon mi rigardas normala. Ĉu mi estas optimisto? Ne, mi estas viro esperanta.”


Ĉi tiujn vortojn parolis la sud-afrika ĉefepiskopo Desmond Tutu la 1-an de junio pasinta en Belgio. Tie li el la manoj de la Dalai-lamao de Tibeto ricevis la Premion 'Lumo de Vero'. Jen du apostolaj ĉampionoj, internacie agnoskitaj kaj pionirantaj por libereco kaj paco surbaze de senperfortaj metodoj.

La premio, kiun la Dalai-lamao transdonis – simpla lampo 'primitive' brulanta – simbolas la fortegan lumon, kiun la ricevinto briligis sur la batalon por homaj rajtoj kaj demokratio en Tibeto, ekde 1949 severe subpremita de Ĉinio. Siavice la episkopo vortigis sian grandan estimon jene:

“Tibetanoj estas homoj simpatiaj kaj talentitaj, kaj ilian vivon traprenetas fido. 'Permesu al ni estiaj kiaj ni estas', jen ĉio kion ili petas de la Ĉinoj. Ili postulas eĉ ne sendependecon, sed sole aŭtonomion kaj la liberecon laŭvivasian kredkonvinkon. Miaopinie nekredeblas ke la Dalai-lamao dum ekzilperiodo 47-jara neniam alvokis al perforto, nek al atencoj,

nek al sinmortigo fare de teroristoj. Li nure kaj pure serĉadis pacamajn solvojn. Mi esperas ke la ĉina okupanto iam ekkomprenos ke libereco kaj demokratio donos profiton ankaŭ al li.”

Sed ankaŭ Tutu ne postrestis. Li estis unu el la gvidantoj de la senperforta batalo kontraŭ apartismo en Sud-Afriko. Al la tuta mondo li ade predikis la perspektivon al pacama solvo. En 1984, dek jarojn antaŭ la fino de la reĝimo de apartismo, li ricevis pro tio la Nobel-premion por la Paco. Poste li alvokis la popolon resanigi la vundojn; samtempe li starigis Komisionon de Vero kaj Repaciĝo, kies prezidanto li fariĝis. Li vidis antaŭ siaj okuloj procesion de 21.000 atestantoj, kiuj kolektive ripetadis la samajn rakontojn pri la plej malnoblaj kaj fiaj praktikoj. Viktimoj kaj postvivantoj devus



Desmond Tutu.
Foto el Vikipedio

havi la ŝancon rakonti sian vivhistorion kaj postuli prodamaĝan rekompencan. La superularon ili devigis detale aŭdi kaj ekkonsciiĝi kiom gigantan suferadon ĝi estis kaŭzinta. Tutu varme pledis

Kompreneble, religio restas por la episkopo tre grava fonto de inspirado, kvankam li agnoskas ke ĉimomente ĝi rezultigas la plej grandajn konfliktojn.

por pardonado, sed antaŭ ĉio la kulpuloj konfesu sian kulpon!

Kompreneble, religio restas por la episkopo tre grava fonto de inspirado, kvankam li agnoskas ke ĉimomente ĝi rezultigas la plej grandajn konfliktojn. Sed lia opinio estas:

“Sen la kredo ne estus homoj kiel Martin Luther King, la Dalajlamao kaj Patrino Tereza, sed ne agadus ankaŭ fundamentalistoj kaj teroristoj. Eĉ la usona Kukluka Klano uzas la krucon kiel simbolon, kaj en Norda Irlando du kristanaj grupoj kontraŭas unu la alian. La kredo estas kiel tranĉilo. Oni povas per ĝi tranĉi panon, sed same mortigi alian homon. Certe, ne estas la kredo mem kiu eraras: religio estas la rezulto de homaj pensoj kaj faroj. Ĝi povas montri al homoj la vojon, sed prefere ne per devige premanta korseto. La koro de la kredo estas la konvinko ke homoj estas dotitaj per libereco, la libereco por elekti. Temas pri tio ĉu oni jes aŭ ne volas roboti. Dio

kreis ĉiujn homojn ne senintence diversaj. Ili estas blankaj, nigraj, grandaj, etaj, belaj kaj malpli belaj. Sed kial? Nu, por diri ke ni bezonas unu la alian. Mi povas esti individua homo nur ĉar troviĝas kun mi aliaj homoj.”

Militojn Tutu konsideras tragikaj eraroj kiuj kaŭzas multe da suferoj kaj detruoj. Sed li restas ĉe la konvinko, ke finfine ĉio iros al bona fino.

“Homoj povas dum jardekoj batali inter si, sed iam prezentiĝos momento, kiam ili eksidos kaj intertraktos, konsciante pri tio ke ili kune povos esti sekuraj kaj liberaj. En Irako suferas milionoj da homoj, sed eĉ tie oni vidas ke homoj povas fari ankaŭ bonaĵojn. En tiuj momentoj mi vidas Dion pensanta: 'Haha, nu vidu, por tio mi kreis la homon!' ”

Kvankam lin foje premas tutmonda suferado, la finfino por li sendube devos esti bona.

“Ofte mi furiozis kontraŭ Dio, eĉ nun ankoraŭ kelkfoje en miaj jaroj pli aĝaj kaj trankvilaj. Mi vidas la malriĉon en Afriko kaj Azio, kaj tiam mi venas ĉi tien kaj demandas al mi: kial? Kiel mi venkas ĉikampe? Mi ploras. Ĉar mi ridas tre rapide, sed ploras ankaŭ tre facile. Kaj kiam mi finploris mi denove pensas: ĉio iam iros al bona fino!”

☪

Evangelio laŭ Tomaso

Esperantigo de Armando ZECCHIN kaj Silvia GARNERO

Ni havas subokule apokrifajon, kiun foje oni mise konfuzas kun la alia de Pseŭdo-Tomaso “evangelio de la infanaĝo” (ĵus esperantigita de Gerrit Berveling por la revuo *Dia Regno*) kiu, fantaziinte pri la knaba vivo de Jesuo, faras lin infano aŭtoro de strangaj kaj morale pridubaj mirindaĵoj.

Oni nomas apokrifajojn kristanaj verkoj kies enhavo kongruas kun la instruoj ricevataj de la apostoloj, kvankam historie multfoje neakordiĝantaj kun la kanonaj evangelioj. Kiam la apokrifajo distanciĝas kaj kontraŭas la komunan doktrinon, ĝi difiniĝas nekristana. Pro tio la evangelio laŭ Tomaso ne estas kristana verko ĉar sinkretisma kaj montranta spurojn de diversaj religioj, kaj super ĉio aperte trapikita de gnozaj doktrinoj.

Historio de la verko

Pri ĝia ekzisto ni jam estas informitaj de aludoj de kristanaj verkistoj de la unuaj tri jarcentoj kiuj alarmas la eklezianojn pro greklingva evangelio laŭ Tomaso. Nun fine ni ĝin havas (ĉu nuran fragmenton aŭ la tuton?) kvankam nur en la kopta lingvo. Tiu ĉi konsistas el io malmulte pli ol cent diraĵoj (antikvagreke logia, kiel foje estis uzate ankaŭ en la esperanta traduko), numere variaj laŭ la

tekstaj fakulaj dividoj. Pro la multenombraj koincindaĵoj de multaj diraĵoj kun tiuj de la kanonaj evangelioj, iuj fakuloj kredis ĝin identigebla kun la fama fonto Q, el kiu la kanonaj kaj aliaj apokrifaj evangelioj ĉerpintus. Fakte iuj tiom emfazis la malkovraĵon pri tiu dokumento, okazintan en la jaro 1945 ĉe la egipta vilaĝo Nag Hammadi laŭlonge de la rivero Nilo kie restis nealirebla laŭ dekok jarcentoj, ke ili kredis, ke ĝi povus esti la origina fonto de la evangelioj kanonaj kaj apokrifaj ĉiuspecaj. Sed, male, tiuj papiraĵoj atribueblas al la komenco de la kvara jarcento kaj la verko datiĝas je la fino de la unua aŭ je unua duono de dua jarcento (100-120), dum la opinioj diskutas kun tro malsamaj solvoj. Nun la demando, pli retorika ol serĉanta respondon jam science kaj historie donita: ĉu la kanonaj dependas de tiu ĉi aŭ tiu ĉi dependas de la kanonaj aŭ ĉiuj dependas de alia fonto? Respondo jam solidigita: la sinoptikaj evangelioj finredaktitaj ekzistis jam ekde la ses-sepdekaj jaroj de la

unua jarcento! Eĉ la simplaj stilformoj de la Tomasa gnostika evangelio estas frukto ne de primitiveco, sed la rezervita stilo de la gnostiko.

La enhavo de la evangelio de Tomaso

La katolika kristanaro de tuj kontestis kaj rifuzis tiun ĉi verkon, same kiel cetero multajn samticipajn (ekzemple, la evangeliojn de Filipo kaj de Judaso Iskarioto). Ĝi apartenas, fakte, al la serio de teologia literaturo kiu transformas la malvirtajn personulojn de la Skribo (Kainon kiu mortigas sian fraton Abelon; Esavon kiu vendaĉas la unuenaskitecon al la frato Jakobo kontraŭ lonto-telero, kaj Judaso, ĉi-kase, kiu perfidas pro amo, ktp) en personulojn kiuj ricevis signifajn revelaciaĵojn. La disĉiploj de Jesuo, ekzemple, estas de la majstro mem pririditaj pro tio ke ili ne adorus la veran Dion, sed malsuperan diecaĵon kiu, kvankam estante la sama de la Malnova Testamento, prezentita en la Genozo kiel kreinto, kondutus tamen kiel demiurgo origininto, fine, de la materia mondo, malorda kaj spiritenprizoniganta. Al iu aparta disĉiplo, ĉi-foje Tomaso, Jesuo revelacius sian veran naturon kaj mision kaj funkcion. Estante tiu disĉiplo la unika lin kompreninta, certamamente tiu ĉi komunikas pere de nova evangelio sekretajn mirindaĵojn trasematajn de gnostikaj spuroj, kiuj en aliaj postaj verkoj de gnostikuloj fariĝos kreskaĵoj minacantaj je sufoko la kristanisman mem. Ili estas:

- a) la animo estis enprizonigita en la korpo;

- b) el la korpo devenas nenio bona kaj saviga, do ĝi estas malŝatinda;
- c) la origino de la malbono kuŝas en misaĵo (se ne malbonago de iu dio aŭ el iu lia supera eona emanaĵo);
- ĉ) Jesuo estas, ja jes samnatura sendito de la Patro sed kun taskoj helpantaj la Patron mem;
- d) ĉiu homo portas esencan lumon jam ekzistintan en la ĉielaj sferoj kaj la homa animo antaŭekzistis en la Lumo kaj nun anhelas tien reveni;
- e) la fina dia venko konsistas el la reveno en la lumo superanta la korpan kondiĉon;
- f) la kreitaro estas la lasta emanaĵo de la unua supera diecaĵo;
- g) la elaĉeto havigita fare de Kristo ne bezonas ties amon kaj krucon: sufiĉus lia gnoza instruo aŭ ilumigo;
- ĝ) ĉio tio estas eksotere revelaciita;
- h) subtaksado de la korpo kuntrenas malŝaton por la seksaj rilatoj kaj seksgenerado (kia veneno kuntrenata en la homan eroton!);
- ĥ) la ĉiela korpo do naskiĝis el Maria ne per vera generado sed kiel akvo pasanta en kanalo;
- i) subtaksado, se ne eliminado, de la historiaj konkretaĵoj de la vivo de Jesuo en ŝajna avantaĝo de lia dieco;
- j) subtaksado de la Malnova Testamento, kie Dio (aŭ lia kaprica emanaĵo) aranĝis enprizonigon de la homa ĉiela animo en karna korpo...

Estas neniu kiu ne vidas kiel tia dok-

trino kontraŭas la kanonajn evangeliojn kaj la aliajn Novtestamentajn dokumentojn, laŭ kiuj:

- a) la homo eniras en la mondon per kreado kaj ne antaŭekzistis,
- b) la malbono, ĉiuspeca, devenas aŭ de la naturo mem de la homo, tia volita de la kreinto, aŭ de la libera homa volo;
- c) la korpo havas la saman dignecon kiel la animo kaj sekvas ties sorton;
- ĉ) nenio sekreta vero komunikita de Jesuo, se ne kiel momenta pedagogia adaptiĝo laŭ la cirkonstancoj por anoncoj destinitaj al ĉiuj;
- d) la homo, eĉ en la venonta spirita vivo konservas sian nunan individuecon;
- e) Dio tute nature transcendas la mondon kiun li kreis, ne emanigis;
- f) la elaĉeto donacita de Jesuo trapasas la krucon kaj postulas nian intiman adheron;
- g) la kreitaĵaro konservas la bonecon en ĝi sematan de la Kreinto kiu vidis ke ĉio farita “bonas” (Genezo, 1);
- ĝ) la korpo de la homo ŝatindas ĉar ties esenco kaj erotemo estas de Dio benataj;
- h) Maria donis karnon al vera homo, ne simplan okazon al ĉiela eono vestiĝi home;
- ĥ) atento kaj elstarigo de ĉiuj homaĵoj de la vivo de Jesuo, kiel manĝi, dormi, suferi, morti, porti krucon ktp;
- i) samvalorigo de la Malnova kaj Nova Testamentoj, respektante il-

iajn malsamajn historiajn kuntekstojn...

La gnozo, kies spurojn oni trovas, rifuzitajn, jam en skriboj de la Nova Testamento kiel en la epistolo al la Koloseanoj (54-57 p.K.) de Paŭlo, dum jardekoj kaj jarcentoj akiris ĉiam novajn formojn kaj malpurigis diversajn herezojn. Eble ĝi estis (kaj estas) la plej grava kaj insida minaco al la kristanismo.

Kvankam plurherezeca, la gnozo transdonas ankaŭ ion science kaj apologie utilan: en ĉiuj gnozaj apokrifajoj estas, evidente, asertata la historia ekzisto de Kristo (pri kio belegaj antaŭmodernaj fakuloj kredis sian scienculan devon dubi aŭ nei); estas asertata, kvankam en kunteksto strangan, la dia transcenda origino de Jesuo, foje lia egaleco kun la Patro, lia supera kaj defintiva funkcio de fina juĝisto, estas asertata lia senedzineco ĉar jam liberigita el ĉio karna allogiĝo...

Ĉu necesas diri ke la gnozo kontraŭas ankaŭ la hebrean religion? Ne necesas, sed utilas evidentigi la destinan samecon: fakte estas batalataj la absoluta senmateria pureco en Dio, la absoluta distingo inter kreinto kaj kreitaro, la boneco de homa korpo, la valora distingo inter la seksoj, la boneco de la geedziĝo... Jesuo de la kanonaj evangelioj rifuzis, el la hebreaismo, nur religion formalismon kaj ekspluatecon de la religio kaj, eventuale, hipokritecon kaj volan miskomprenon pri sia mesia karakterizo (elementojn, certe, nereligiajn).

Se la aŭtoro(j) de la evangelio de Tomaso estas ne konata(j), ni konas la postajn epigonojn de la gnozo: Bazilido,

Erakliono, Valentino... kiuj batalis la kanonajn evangeliojn kaj faris el Jesuo vilaĝa saĝulo, komunikanto de sekretaj scioj.

Kiu estis Tomaso

Fiŝkaptisto de Galileo kiu kune kun aliaj homoj, Tomaso estis alvokata de Jesuo al ties sekvado kiel unu el la dekdu apostoloj (en Johano kromnomata DIDIMO = ĝemelo). En tiu tasko, li distingiĝis pro jeno: li esprimas certan pesimismon kiam Jesuo entreprenas la lastan vojaĝon al Jerusalemo, kaj preskaŭdefie diras: “iru ankaŭ ni morti kun li”, kaj restas nekredanto antaŭ la novaĵo de la resurekto de Jesuo, preta tamen

opiniŝanĝi ok tagojn poste kaj konfesi sian kredon kun la famaj vortoj: “Mia Sinjoro kaj mia Dio”. Ne nur: li jam antaŭe provis scii pli pri Jesuo de Jesuo mem per demandoj kiel: “Sinjoro, ni ne scias kien vi iros, kaj kiel ni povas koni la vojon?”. Certe la tono kaj la signifo de tia demando kontribuis, laŭ la unuaj jarcentoj de kristanismo, eksciti la fantazion de la apokrifajfarantoj kiuj tamen nenion historian transdonis pri Jesuo. Laŭ komunaj rakontaĵoj, sed malfruaj, Tomaso evangelizis Hindiajn teritoriojn kie je lia nomo hindaj kristanoj fondas sian kredon. En la Katolika kalendaro oni festas Sanktan Tomason la trian de julio.

☪

Neimageblaj sablaj skulptaĵoj


Randy Hofman ne bezonas multajn ilojn por disigi sian kredon je Jesuo Kristo al milionoj da homoj. Dum pli ol 30 jaroj Randy uzas sian artistan talenton por krei neimageblajn sablajn skulptaĵojn ĉe la marbordo. Ĉiuj liaj skulptaĵoj portas komunan temon – la vorto de Dio. Per ili Randy vivigas la Biblian mesaĝon. La skulptaĵoj igas la preterpasantajn homojn halti kaj rigardi. Kelkfoje Randy staras proksime kaj klarigas la signifon aŭ respondas demandojn. Krome li metas klarigajn faldfoliojn, kiujn vizitantoj povas preni. Proksimume unun milionon da faldfolioj li disdonis ĝis nun.

Laŭ Randy ĉio ajn estas bona por laŭdi Dio. ”Dio investis ion en ĉiu homo. Estas nia tasko serĉi, praktiki, elpreni kaj redoni tion al Li”.

Vizitu lian ttt-paĝon por vidi pli da bildoj.
<http://www.randyhofman.com/index.htm>

Fotoj uzataj kun afabla permeso de la artisto.





Pri la beata maljuna monaĥo Johano el la vilaĝo Olenevka, Penza regiono

Larisa KUZMENKO, RU

En Rusio sudoriente de Moskvo estas la bela urbo Penza kie oni restaŭras malnovajn preĝejojn kaj konstruas novajn belajn templojn. En la jubilea 2000a jaro la Rusa Pravoslava (Ortodoksia) Eklezio dum la Kunveno de Arĥipastroj en la Templo de Kristo la Savanto en Moskvo en aŭgusto glorigis multe da niaj kristanoj, kiuj suferis pro la kristana kredo. Ili fariĝis sanktuloj kaj novaj martiroj – la rusaj konfesantoj de la 20a jarcento. Inter ili estis episkopo Teodor, pastroj Vasilij kaj Gavriil el la Penza eparĥio. Ili estis mortigitaj dum la terura 1937 jaro de stalinaj reprezalioj. Bedaŭrinde iliaj tomboj ne estas trovitaj, sed nia Sinjoro donis al ni la grandan donacon – la sanktan relikvon de la maljuna pastro Johano Olenevskij, kiun oni glorigis ankoraŭ pli frue kaj dum lia vivo. Ĉiu kristano en la Penza regiono scias pri la saĝa maljunulo Johano, kiu posedis la favoran preĝon de kurado de homaj animoj kaj korpoj.

Ivan Vasiljeviĉ Kalinin, kiu estis Johano Olenevskij, vivis longan vivon. Li naskiĝis en 1854 en la vilaĝo

Olenevka, Penza regiono kaj liaj gepatroj mortis kiam li estis malgranda knabo. Lia sano estis malbona kaj li laboris kiel simpla metiisto: trikadis diversajn aĵojn. Tamen la plej grava agado en lia vivo estis gracoplena preĝado kaj vizitado de la Teotokprezenta templo en la vilaĝo Olenevka, kie li helpis al la pastro kiel altaristo, kaj kiam li estis 7-jara li komencis legi ĥorlibron kaj kantis en ĥorejo. Eĉ dum sia infaneco li vivis askete kaj sola. Nokte li arde preĝis kun larmoj, malmulte manĝis kaj amuziĝis.

En la jaro 1920 Ivan Vasiljeviĉ estis ordinita kiel diakono de la arĥiepiskopo Johano Pommer – la estonta ĉefo de la Latva Eklezio kaj martiro pro la soveta reĝimo.. Poste Ivan servis en la temploj de la vilaĝoj Olenevka kaj Solovtsovka (Penza regiono).

Ankoraŭ antaŭ la revolucio la kristanoj de la Penza regiono honoris lin kiel saĝulon. Li ĉiam konsolis homojn en iliaj suferoj kaj malĝojoj, respondis la demandojn de la lokaj kristanoj, kuracis iliajn malsanojn kaj animojn. La kontraŭdia soveta potenco malamis la larĝe konatajn agojn



de Johano. Li estis kulpigita pro kontraŭsoveta agitado kaj kontraŭrevolucia agado ĉar multaj homoj vizitis lin. Malgraŭ tio, ke li estis maljuna oni lin trifoje arestis, enketis kaj dum kelkaj monatoj li estis en malbonaj kondiĉoj de la Penza prizono.

Pro liaj ardaĵoj preĝoj nia Sinjoro Jesuo Kristo savis lin kontraŭ foraj ekziloj kaj helpis al li elteni batojn de la malamikoj. En nia Eklezio Johano estis kiel mentoro, konsolisto de la Penza regiono dum la malfacilaj 30-jaroj kaj la jaroj de la Granda Patrio-defenda Milito (1941-1945). Do, en la tempo, kiam la Rusa Ortodoksia Eklezio estis sensangigita per la kruelaj represalioj kaj kiam estis fermitaj preskaŭ ĉiuj preĝejoj, la spirita heroeco de la beata Johano estis ege grava.

Fine de la milito la Soveta Ŝtato iom malstreĉis sian striktan rilaton al Eklezio. En la Penza eparĥio komence de la milito funkciis du temploj (antaŭ la revolucio tie estis mil temploj) kaj en 1945-46 estis restarigitaj diservoj en 28 preĝejoj inkluzive en la Sergieva preĝejo en Solovtsovka, kie Johano Olenevskij servis kiel diakono. La 2an de septembro 1946 li estis ordinita de la episkopo Miĥaelo kiel pastro. Per tio la Sinjoro donacis al la beata Johano la flamon de la nefleksebla kredo kaj senĉesa servo al Dio kaj paroĥanoj kaj per ili al la sekvantaj generacioj.

La 6an de aŭgusto, 1951 en la aĝo de 97 jaroj la Sinjoro vokis lin en sian Sanktan Loĝejon. La glorigita pastro estis enterigita en la tombejo de la vilaĝo Olenevka sur la loko kiun li

mem elektis. Kiel dum lia vivo ankaŭ post lia morto al lia tombo senĉese iris multe da homoj. Johano helpas al la kredantoj eĉ nun, kiam ili preĝas antaŭ lia tombo aŭ lia relikvo en la templo.

Dum la 45a datreveno de lia forpaso la 6an de aŭgusto 1996 laŭ la beno de la Mastro Serafimo la relikvo de la granda saĝulo estis transportita en la vilaĝon Solovtsovka pli proksime al la Sergieva preĝejo por ke la homoj povu inde adori lin.

Pro la konfesplena kaj asketa agado, senĉesa popola honorado kaj pro liaj kuracaj eblecoj la Sankta Sinodo la 27an de decembro en 2000 metis la pastron Johanon Kalinin-Olenevskij en la vicon de la novaj rusaj martiroj kaj konfesantoj de la 20a jarcento.

La 6an de aŭgusto kiam mortis la maljunulo kaj la 11an de septembro dum la tago de la Senkapigo de Johano la Baptisto, la tago de lia patronfesto multaj rusaj kristanoj vizitas lian tombon. Ili preĝas ankaŭ en la apuda templo. Kia nepriskibebla favoro fluas de la lokoj: de la trankvila vilaĝo kaj la sankta akva fonto kie la homoj povas trinki la sanktan akvon kaj lavi sin per malvarma freŝiga akvo dum varmega vetero.

Dum la tuta vivo Johano Olenevskij ĉiel penis kaŝi siajn heroaĵojn, sed ne povis fari tion, ĉar Dia favoro helpis al li brili kiel lumigilo sur la alta monto. “Malfermu puran koron kaj preĝu”, – ofte diris la maljunulo. La vortoj estas nun ankaŭ tre aktualaj.

✠

Sur la ŝtupoj de la Dia Domo

Larisa KUZMENKO, RU

Somere en nia urbo estis malfermita ankoraŭ unu nova templo. Ĝi estas dediĉita al la sanktulo Aleksio. La templo situas apud la ripozejo (sanatorio) “Kluĉiki” (=fontoj). La unua diservo en la templo estis kondukita kaj aranĝita de la Jekaterinburga arĥiepiskopo Vikentio kaj estis dediĉita al la memoro de la Tagilaj malliberuloj, viktimoj de la stalinaj reprezalioj dum la sovetia periodo.

La templo estis konstruita dum mallonga tempo – 15 monatoj. La krucoj por ĝi estis faritaj en la urbo Ĉeljabinsko (sude de Jekaterinburgo), la bela fajenca ikonostazo estis skulptita en la urbo Siserto kaj la sonoriloj estis fanditaj en la urbo Kamensk-Uraljskij – ambaŭ urboj estas en la Sverdlovska regiono. ☩



Dum la tago de la malfermo de la templo



La templo apud Kluĉiki en N. Tagil

Aldono

Laŭ unu el la ĉefaj svedaj gazetoj, Svenska Dagbladet 14 okt 2006, la situacio por la ortodoksa eklezio en la antaŭa Sovetunio multe ŝanĝis post la sistemsanĝo. La nombro de malfermitaj preĝejoj kreskis de 7500 ĝis 19000 dum 25 jaroj. Same la monaĥejoj kreskis de 20oj ĝis nun 480. Ankaŭ la leĝa stato por la eklezio pliboniĝis. La prezidento Putin konfesas sian personan kredon kaj partoprenas en multaj ekleziaj festoj.

/Redaktoro

Kio estas la familio.

Prediko dum 42a Baltlandaj esperantotagoj 4 an de julio 2006.

Erikas LAICONAS

Miaj karaj gefratoj,

Mi ĝojas pro la ebleco hodiaŭ paroli al vi. Mi ne hazarde elektis tiun ĉi legaĵon por homilio. Nuntempe en niaj landoj estas troa libereco. Libereco paroli kion ni volas, libereco vojaĝi kien ni volas, libereco prirabi la proksimulon, bati aŭ murdi, diboĉi aŭ vendi knabinojn kaj aliaj multaj liberecoj, pro kiuj oni punas simbole aŭ entute ne punas. Tial en niaj landoj dum tre mallonga tempo ekaperis multaj milionuloj, entreprenistoj kaj neniu interesiĝas de kie ili gajnis la monon.

La hodiaŭa legaĵo parolas al ni pri la familio. Antaŭ la milito en nia lando estis diraĵo: familio estas fundamento de la ŝtato. Kaj nun oni tre multe parolas pri sekso. Ne pri amo, sed pri sekso. La vorto de Dio parolas pri viro kaj virino, kiuj fariĝos unu karno. Ne du, sed unu. Tiel ordinare devas esti. Nuntempe oni diras: unue devas esplori la karakteron de la alia, kune

vivi iun tempon, tiam estos pli forta familio. Sed faktoj diras kontraŭon. Multaj tutan vivon esploras kaj ne kreas familion. Ne havas respondecon pro la familio, pro la infanoj, kiuj post la naskiĝo plenigas infanhejmojn kaj ofte ne konas siajn gepatrojn. Dum televidaj elsendoj ni ofte aŭdas: ĉu vi estas paro? Oni ne

parolas pri unu karno, sed pri paro. Printempe ordinare nur birdoj kaj sovaĝaj bestoj pariĝas kaj aŭtune disiĝas. Ĉu paro povas esti familio? Ne. Familio ligas amo, ne sekso, sed amo. Jesuo Kristo multe parolis kaj pere de la Biblio ankaŭ nun parolas pri la amo, pri devoj de la familianoj. Patro kaj patrino, infanoj.

Kaj ili diris: Moseo permesis skribi eksedzigan leteron, kaj forsendi ŝin. Sed Jesuo diris al ili: Pro la malmoleco de via koro li skribis por vi ĉi tiun ordonon. Sed de la komenco de la kreo: Li faris ilin vira kaj virina. Tial viro forlasos sian patron kaj sian patrino, kaj aliĝos al sia edzino, kaj ili estos unu karno; sekve ili estas ne du, sed unu karno. Kion, do, Dio kunigis, tion homo ne disigu.

(Mar. 10:4–9)

Apostolo Paŭlo skribas al Korintanoj: *“Pro malĉastajoj ĉiu viro havu propran edzinon, kaj ĉiu virino havu propran edzon. La edzo donu al la edzino ŝian rajtajon; tiel same ankaŭ la edzino al la edzo. Ne la edzino, sed la edzo rajtas pri ŝia korpo; tiel same ankaŭ ne la edzo, sed la edzino pri lia korpo. Ne senigu unu*

la alian, krom eble kun konsento por kelka tempo, por ke vi dediĉu vin al preĝado, kaj kuniĝu denove, por ke satano vin ne tentu pro manko de sinregado.”(1 Kor. 7:2–5).

Kaj en nia lando oni dissendas pere de televido – ŝanĝi edzinon. Ĉu tio estas kristana lando? Mi dubas. Tio estas pli proksime al la idola lando.

Kaj kiom multaj estas disiĝintoj? Kompreneble. Iam okazas, ke normale ne povas kunvivi la homoj. Jesuo Kristo parolas:

“Estas ankaŭ dirite: Kiu forsendas sian edzinon, tiu donu al ŝi eksedzigan leteron; sed mi diras al vi, ke ĉiu, kiu forsendas sian edzinon, krom pro malĉasteco, igas ŝin adulti; kaj kiu edziĝos kun forsenditino, tiu adultos.” (Mat 5:31-32)

Multaj verŝajne diros: Ni ne dormas, kontraŭe, ni tre gaje vivas. Sed gaje vivi, sen Dio ne estas certa vivo. Tio estas kvazaŭ vivo de ebrulo, kiu forgesas nian Kreanton.

Tio ankaŭ temas pri la fideleco de ili ambaŭ; edzo kaj edzino, unu al la alia. Sed estas tiaj, kiuj ne diaras, sed kverelas, interbatas inter si, eĉ iam murdas, kripligas siajn infanojn. Tion do ne devas fari kristanoj. Verŝajne ili ne estas kristanoj, kvankam diras, ke estas, ĉar iam en juneco ili estis baptitaj, sed poste sen spirita manĝo ili verŝajne anime mortis aŭ ekdormis. Jesuo vokas nin ĉiujn: vekigi, ne dormu.

Multaj verŝajne diros: Ni ne dormas, kontraŭe, ni tre gaje vivas. Sed gaje vivi, sen Dio ne estas certa vivo. Tio estas kvazaŭ vivo de ebrulo, kiu forgesas nian Kreanton. Forgesas, ke la vivo sur tiu ĉi provizora mondo ne estas tre longa. Ĝi povas subite finiĝi kaj ni estos vokitaj forlasi tiun ĉi mondon, ĉiujn ĉiterajn ĝojojn, sendepende ĉu ni estas juna homo aŭ maljuna.

Kaj kion diras apostolo Paŭlo al la korintanoj:

“Aŭ ĉu vi ne scias, ke la maljustuloj ne heredos la Regnon de Dio? Ne trompiĝu: nek malĉastuloj, nek idolanoj, nek adultuloj, nek molmoruloj, nek viruzaĉantoj, nek ŝtelistoj, nek aviduloj, nek drinkuloj, nek insultantoj, nek rabemuloj heredos la regnon de Dio.”

La listo estas tre longa. Ni pripensu; ĉu ni ne estas inter tiaj?

Kompreneble, geesperantistoj plej parte ne estas tiaj. Sed kiu scias. Oni diras: Guto post guto eĉ ŝtonon traboras. Kaj en niaj landoj regas senfina libereco kaj multaj stultaĵoj atakas niajn landojn. Tio estas tre grava al niaj landoj, kiuj kompare antaŭnelonge liberiĝis de la kontraŭkristana reĝimo. Ni rigardu al rivero. Kiam rivero estas barita per digoj kaj farita akvobaseno, ni povas ĝoji; naĝi, sunbruniĝi en la sunradioj. Sed ordinare homo ne gardas la naturon, forĵetas diversajn malpuraĵojn kaj finfine la akvobaseno malpuriĝas. Kaj kio okazas, se ni malfermas kluzon? Unue foriras surfaca tavolo portante diversajn malpuraĵojn, kaj nur poste fluas la pura akvo. Ĉu en niaj landoj ne okazis simila

situacio kiam post la regajno de sendependeco al niaj landoj komencis “flui” okcidenta vivmaniero? Do, unue venis ne tre bonaj kutimoj kaj homo pli rapide akceptas malbonon ol bonon. Do ni, ĉiuj kristanoj, devas esti singardaj. Se ni ne atentis, ni malpurigas niajn vestaĵojn. Ankaŭ la animon ni povas malpurigi. Sed sciu, ke malpurigi estas pli facile ol liberiĝi de la malpuraĵoj. Precipe, kiam temas pri la animo. Homo tre rapide alkiutimiĝas al malbono, ĉar homo ne estas forta. Nur Jesuo Kristo povas al ni helpi. Do ni ne estu kredantoj nur laŭ formo, sed veraj kredantoj. Multaj diras: Mi estas kristano. Mi estas baptita, sed ne praktikanta. Tia diraĵo similas; Mi estas vegeterano, sed ne praktikanta. Tio signifas, se ni ne praktikas la kristanan vivon, ni ne estas kristanoj. Kial mi al vi diras tiujn ĉi vortojn? Do pro tio, ĉar nuntempa vivo en niaj landoj estas ege malbona. Pasintsemajne mi spektis pere de televido okazon kiam viro forlasis edzinon, forveturis al alia granda urbo kaj vivas kun alia virino aŭ knabino. Alivorte li vivas en bigamio kaj tion fakte permesas la ŝtato. Pli frue tion oni faris kaŝe kaj nun publike. Kiam la edzino volis vidi sian filon, tiu riĉa malĉastulo

pere de polico kaj rapida helpo ŝlosigis ŝin en psikan malsanulejon kaj perforte “kuracigis” ŝin. Kuracigis sanan homon, sian edzinon! Mi ne povis imagi, ke en nunaj tagoj, kiam sovetismo jam estas

Do, unue venis ne tre bonaj kutimoj kaj homo pli rapide akceptas malbonon ol bonon. Do ni, ĉiuj kristanoj, devas esti singardaj. Se ni ne atentis, ni malpurigas niajn vestaĵojn. Ankaŭ la animon ni povas malpurigi. Sed sciu, ke malpurigi estas pli facile ol liberiĝi de la malpuraĵoj.

forigita, tio povas okazi. Mi deziras, ke ni, geesperantistoj – kristanoj, estu veraj kredantoj, ĉar ne povas ĉio okazi sen iu pli forta estaĵo, kreanto, kiu estas Dio. Ni petu helpon de la Plejaltulo ĉiutage preĝante matene kaj dankante vespere kaj plenumante ordonojn de la Plejaltulo. Tiam ni gajnos eternan vivon en Dia regno. Jesuo Kristo, helpu al ni esti fortaj. Amen.

Post la prediko estis tralegita listo de forpasintaj geesperantistoj de Estonio kaj kantita himno “Ne scias mi kiam mi mortos“. La listo ampleksis 43 personojn.

Mi kore dankas al katolika seminariisto Marius Diglyls, kiu helpis al mi kaj al Aŭgusto Kilk kaj lia filino Stela, kiuj legis vorton de Dio. Diservo finiĝis, sed la geesperantistoj ne rapidis foriri. Post la BET- 42 oni skribis al mi el Saaremaa, ke lokaj homoj miris, ke eĉ diservo okazas en Esperanto. Do tio estas tre bona kaj praktika lingvo.

En la 30-jaroj de la pasinta jarcento, virbebo kaj bebino naskiĝis en malgranda vilaĝo de Ĉinio. Iliaj hejmoj situis unu apud la alia, estis bona najbareco. La du familioj okupiĝis pri terkulturado kaj estis tre malriĉaj.

En tiu tago, kiam ambaŭ, la knabo kaj la knabino, kune laboris sur la kampo, li diris al ŝi: "Se mi havas nur bovlon da rizkaĉo, tiam estas certe ke mi donas al mia patrino la duonon, kaj al vi la alian duonon." La knabino estis kortuŝita de liaj vortoj. Ŝi komencis enamiĝi en lin. En tiu jaro li estis 12-jara kaj ŝi estis 10-jara.

Dek jaroj pasis. En la jaroj iam okazis akvego, pro kiu vilaĝa rivero inundis la kampojn, detruante la rikoltojn. Multaj vilaĝanoj falis en akvegon. Li brave savis la vivon de pluraj dronantoj. Ankaŭ ŝi estis subakvigita kaj baraktinta en akvo, sed por savi maljunulon li ne savis ŝin persone kaj ĝustatempe. Post kiam ŝi estis savita de alia homo, mallauĉe li diris al ŝi: "Mi estas korinklina al vi. Se vi mortus, mi ne volus sole vivi." Ŝi komprenis lin. En tiu jaro ili geedziĝis. Tiam li aĝis 22 jarojn kaj ŝi 20 jarojn.

Poste, granda natura katastrofo trafis la regionon. Ili estis tiel mizerantaj, ke en ilia hejmo nur restis iom da faruno kiel manĝgreno. El ĝi ili faris bovlon da farunaĵo kun supo. Li volis lasi, ke ŝi manĝu ĝin. Ŝi ĝin forpuŝis, sed petis, ke li manĝu ĝin. Finfine ili dividis la bovlon da farunaĵo en du porciojn kaj manĝis po

duonon. Tiujare ili ambaŭ estis en aĝo super 40 jaroj. Ili ankoraŭ trenis sian vivon de mizero al mizero.

En 1960-70-aj jaroj en Ĉinio la diktatora reĝimo tiel ekagis sub preteksto de la "Kultura Revolucio", ke multaj ordinarnaj ĉinoj estis erare punitaj per punlaboro aŭ en punlaborejigo. Nur ĉar lia avo iam elmigris en okcidentan landon kaj komercis kun alilandanoj la registaro punis lin kaj ĵetis lin en punlaborejon. Dum tiuj malfacilaj jaroj, lia edzino ĉiam akompanis lin, farante punlaboron kune kun li. La malfeliĉaj geedzoj silente eltenis la maljustan sorton. En granda terura kaj malfacilo ili renkontis siajn aĝojn de pli ol 50 jaroj.

Multaj jaroj tiel pasis. Tiam ili jam forlasis la vilaĝon kaj enlokiĝis en la urbon. Estis kutimo, ke ĉiumatene ili ambaŭ veturis per aŭtobuso por iri al parko de la antaŭurbo, kie ili promenadis kaj distris sin. Kiam en aŭtobuso iu lasis al ili sidlokon, neniu el ili volis sidiĝi kaj restigi la alian stari. Ĉiuj veturantoj rigardis ilin kun estima kaj respekta rigardo. Tiun jaron li estis 72-jara kaj ŝi 70-jara.

Ŝi diris ofte al sia edzo: "Post dek jaroj, se ni ambaŭ estos mortintaj, tiam mi certe ŝanĝiĝos en vin, samtempe ankaŭ vi nepre ŝanĝiĝos en min. Poste vi plu venos por manĝi la bovlon da rizkaĉo, kiun pretigis mi speciale por vi!"

La kuna vivado, ordinara kaj simpla, dum kelkdek jaroj, ja estas por ili sopirinda amsento. ☺

Nova Biblio – germanlingva

Karl Heinz SCHAEFFER, DE

Ĵus estis en Germanujo eldonita nova bibliotraduko en la germana. Sur 2400 paĝoj oni prezentas “Blibion en justa lingvo“. Post kvin jara tradukprocedo oni nun prezentis ĝin por la publiko.

La ideo por “bibliotraduko en justa lingvo” unue devenis el cirklo de feminista teologio, ĉar virinoj ludas unuflanke en la Biblio rimarkindan grandan rolon, sed oni forgesis ilin ofte en la interpretadtradicio. Per la nova traduko oni volis fari virinojn, iliajn aferojn kaj spertojn videblaj.

Laŭ la tradukistoj estas ĉagrene por multaj virinoj, ke en la bibliotraduko de Martin Luther oni ĉiam legas “Sinjoro”, kiam oni parolas pri “Dio”. Fakte retiriĝus Dio de ĉiuspeca imagopovo. Li estus nek vira nek virina. Pro tio ili uzas ĉiam, kiam staras “sinjoro” en la germana lutera traduko nun la hebrea “Adonaj”, ĉar al judoj ne estas permezata, eldiri la dionomon, kaj uzas i.a. Adonaj. La 52 getradukistoj nomas Dion foje “la eternulino”, “la eternulo” aŭ “la vivantino”. Per la ŝanĝo de gramatika gento oni volas atentigi, ke Dio estas sengenta kaj ke homoj ne povas fari personecan imagon pri Li.

Post la publikigo kompreneble oni ne aŭdas nur konsenton pri la nova Biblio. Ekstis legeblaj el diversaj direktoj kritikoj de kelkaj gravaj teologoj. La profesoro de la fako pri la Nova Testamento en la universitato de Lepzigo, Jens

Schröter, ekzemple taksas tiun Blibion netaŭga nek por la paroĥa laboro kaj nek por privata uzo. Li kritikis, ke la historia tekst-origino estis deformite tradukita. Krome oni ne aplikis konsekvence la

La ideo por “bibliotraduko en justa lingvo” unue devenis el cirklo de feminista teologio, ĉar virinoj ludas unuflanke en la Biblio rimarkindan grandan rolon, sed oni forgesis ilin ofte en la interpretadtradicio.

“inkluzivan lingvon”. Oni nomis ja la biblian (libron de) “Juĝistoj” nun “Pri la tempo de Juĝistinoj kaj Juĝistoj”, sed “perforte enpenetri domon kaj ŝteli” faras nun kiel antaŭe nur ŝtelistoj (ne ŝtelistinoj) kaj por la Diabolo restis ankaŭ la vira gento. – Estas certe, ke en la venonta tempo pliaj kritikantoj levos sian voĉon.

Kiamaniere oni estonte akceptos tiun Blibion montriĝos nur en la estonteco. Sed la vendado estis sufiĉe sukcesa. La unua eldonkvanto jam estas elĉerpita. Pliajn eldonojn oni planas, sed plej frue kiam oni denove havos la bezonatan paperon por presado.

[Tiu ĉi artikolo temas pri germanlingva traduko kaj havas nenian rilaton kun la nova eldono de la esperantlingva Biblio. /red] ∞

Raporto de la K.E.L.I.-jarkunveno (17-08-2006)

Partoprenas 15 membroj kaj la jenaj estraranoj: Philippe Cousson, Els van Dijk, Siegfried Krüger, Bengt Olof Åradsson, Pavel Polnický, Irén Bagi, Britta Rehm, Jacques Tuinder, Zoltán Somhegyi. Samuel Gaillard ne partoprenis la kongreson.

- 1 **Malfermo.** La prezidanto, Philippe Cousson, malfermas la kunvenon kaj bonvenigas la ĉeestantojn.
- 2 **Elektio de la kunprotokolantoj.** Sieglinde Stamm kaj Vera Tuinder anoncas sin kaj la membroj aprobas.
- 3 **Fikso de la tagordo.** Neniu proponas ŝanĝojn aŭ aldonojn.
- 4 **Komunikoj.** Baldaŭ elĉerpiĝos la provizo de la Biblio. La kvanto de la nova eldono de I.K.U.E. kaj K.E.L.I. estos 4000 ekzempleroj el kiu K.E.L.I. pagos 1000. Ĝi estos iom alie aranĝita kaj presita en Germanio. La vendoprezco estos € 19,80 po ekzemplero kaj po € 13,20 por 3 samtempe menditaj ekzempleroj. El la gajno de la vendo de la novaj testamentoj estis € 500,- donacitaj al EVIDENTE.
- 5 **Funebra memorigo.** Forpasis la jenaj membroj; Britio: s-ro Arthur Gardner, s-ro Peter Hayward. Estonio: d-ro Bielsa Vispe. Francio: d-ino Yvette Vierende. Ger-

manio: s-ro Gerhard Kalkhof. Hungario: d-ro Balazs Szemök. Nederlando: s-ino Louise v.d. Pauw. Ni rememoris ilin dum silenta momento.

- 6 **Sekretaria jarraporto.** La sekretariino, Els van Dijk, aldonis kelkajn informojn. La kasistino de la Finna sekcio ĉesos sian laboron. Nian revuon Dia Regno ni ne plu sendas al Estonio. Mankas membroj en tiu lando. Karl-Heinz Schaeffer aldonas ke en la suda parto de Germanio okazas regulaj diservoj en Esperanto i.a. en Stuttgart. En Aalen okazis ekumena diservo kun 30 personoj.

Bedaŭrinde ne anoncis sin posteulo por la sekretariino kiu ne estos reelektebla en 2007.

La estraro ne povas solvi tiun problemon sen helpo de la membroj. La kasisto salutas nome de kasistino de la Finna sekcio. Li ankaŭ raportas pri aliaj eksterlandaj kasistoj. Latvio ricevas senkoste nian organon.

- 7 **Kasista jarraporto.** *La kasisto demisios en 2008 kaj posteulo estas serĉata!* La antaŭa eldonisto plenumis ĉiujn siajn repagdevigojn. La membroj akceptas la raporton.

8 **Raporto de la kaskontrolantoj.** Karl-Heinz Schaeffer kaj Horst Hub kontrolis kaj aprobis. Ili estas pretaj denove kontroli en 2007.

9 **Buĝeto.** La profito malkreskas. Kio estas la kostoj de la librovendado? Ni elspezas monon por la libroj. La gajno aŭ perdo dependas de la diferenco inter la kostoj kaj vendoj el la libroprovizo. Kiel trovos novaj membroj la vojon al K.E.L.I.? Estas propono donaci nian organon al la kandidatoj kiuj plenumas la ŝtatan lingvo-ekzamenon de Esperanto en Hungario. Ĉu ni kreu pere de nia ttt-paĝo eblecon peti senpagan ekzempleron? La buĝeto estas akceptita.

Ni dankas la kasiston Siegfried Krüger por lia tre klara raporto.

10 **Raporto de la redaktoro de Dia Regno.** Li ŝatus scii kion aperigi en Dia Regno. La redaktoro provis publikigi multvariajn artikolojn kaj li dankas la sendintojn. Dia Regno estas de ni ĉiuj do ni sendu fotojn, raportojn kaj tiel plu. Éva Farkas korektas. Estas demando pri la ebleco ricevi nian revuon en parolita formo.

11 **Estrarelekto.** Irén Bagi estas reelektita (2006-2009). Ŝi ne trovis posteulon en Hungario. Laŭ statute devas ĉiun jaron demisii 1/3 de la estraranoj. En 2007 devus pro diversaj kaŭzoj demisii 6 personoj. Tio ne eblas laŭ la statutoj. Tial proponas la estraro la nunan

demision de Bengt Olof Åradsson kaj Zoltán Somhegyi anstataŭ en 2007. Ili estis reelektitaj (2006-2009).

En la jaro 2007 ni atendas problemon ĉar la sekretariino, kiel dirite, ne plu estos reelektebla. Speciala zorgo estas la oficiala registriĝo en la Nederlanda Ĉambro de Komerco pro la bankkonto en tiu lando. En 2008 finiĝos la deĵorperiodo de la kasisto. Ni serĉas posteulon.

12 **Ekumena Kongreso.** Ĝi okazos 21-29 Julio 2007 en Pelplin (Pollando) en Seminario de la Rom-Katolika Eklezio. La urbeto Pelplin situas en la Nord-Okcidento apud Gdansk kaj Marlborck. Samtempe okazos la 8-a Junulara Esperanto Tendaro. La kongresa temo estos: Joh. 4:16 “Dio estas la amo”. La subtitolo, “La ĉefa donaco de Jesuo – kaj ni...? La Universala Kongreso okazos en 2007 en Japanio kaj en 2008 en Rotterdam (Nederlando). Ni ne havas jam proponon pri K.E.L.I.-kongreso en 2008.

13 **Ideoj kaj sugestoj de la membroj.**

- Pli frua decido pri la kongresa temo.
- Kiel allogi gejunulojn? Sekvas iom da diskutado sen fina konkludo.
- En la preparo de Ekumenaj Kongresoj estu pli da ekvilibro

inter I.K.U.E. kaj K.E.L.I. Sekvas kelkaj rimarkoj pri la programo (malmulte da influo flanke de K.E.L.I.), la subvenciado de partoprenantoj kaj la Ekumena Kongresa Regularo. Tri el niaj membroj, Pavel, Zoltán kaj Elizabeta preparolos tiujn regularojn. La kotizoj de 2007 estas altaj por tiuj kiuj ne povos ĝui la rabatsistemon. Tiu sistemo estas alloga sed defecito estos granda risko. Iu rimarkas ke la esprimo ‘komuna kongreso’ estus pli bone.

- La sekretariino petos al Marilu Münger ĉu ŝi volas resti membro de la Ekumena Komisiono?
- Wil van Ganswijk informas pri sia sukcesplena interretkurso por komencantoj. Estis malfacile varbi gelernantojn per personaj kontaktoj. Nun anoncas sin facile

interretgelernantoj.

14 **Fermo.** La prezidanto fermas la kunvenon. (Adoru 560).

Raportis:

Els van Dijk-Kuperus

Kunprotokolantoj:

Sieglinde Stamm, Vera Tuinder.

Estraro de K.E.L.I.

(inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo):

prezidanto: Philippe COUSSON (2007)

kasisto: Siegfried KRÜGER (2008)

sekretario: Els van DIJK (2007)

redaktoro: Bengt O. ÅRADSSON (2009)

membroj: Pavel POLNICKÝ (2008)

Britta REHM (2008)

Jacques TUINDER (2007)

Irén BAGI (2009)

Zoltán SOMHEGYI (2009)

Samuel GAILLARD (2007)



La plej multaj estraranoj dum la jarkunveno. De maldekstre: Bengt Olof Åradsson, Pavel Polnický, Siegfried Krüger, Philippe Cousson, Els van Dijk, Zoltán Somhegyi, Britta Rehm. Ekster la bildo troviĝas Jaques Tuinder kaj Irén Bagi . Fotis Sieglinde Stamm

Kokoj sur preĝejaj turoj.

En Nederlando aperas ĝenerale sur la turoj de Rom-Katolikaj preĝejoj krucoj kiel ventomontriloj; sur la turoj de Protestantaj preĝejoj aperas koko sur kruco kaj sub la koko estas globo. En tiu globo oni malkovras dum riparo ofte iun dokumenton el la pasinteco. Ekzemple en la globo de la foto oni malkovris dum riparo en 2001 dokumenton pri la riparo (prezoj ktp.) de la koko de la Stephanuspreĝejo en la jaro 1890 (vilaĝo Hardenberg).

Lutheranaj preĝejoj en Nederlando (malmultaj) havis cignon.

En la interreto mi trovis la jenan eksplikon de iu reformita pastoro pri la koko kiel ventmontrilo: La ventmontrilo kun koko rememorigas nin al la rakonto el la Biblio pri Petro (Marko 14:72). Petro malkonfesis 3 fojojn Jesuon. La koko do avertas nin ke io ajn povos okazi ankaŭ al ni. Sed la koko estas ankaŭ la signo de la komenco de la nova tago kaj leviĝo.

Tial la koko aperas sur la turoj de multaj Reformitaj preĝejoj en kiuj oni ne nur proklamas ke komenciĝas nova tago. Krome okazas la plej multaj diservoj dimanĉe, en la unua tago de la semajno.

Multaj preĝejoj en la nordo kaj la nordoriento de Nederlando ne plu portas kokon kiel ventmontrilo sed aliajn bestojn. La bestoj devenas el la blazonoj de la nobelaj familioj kiel ekzemple leono, fiŝo, ĉevalo.

laŭ informoj el la interreto: Els van DIJK



Kun intereso mi komencis legi kaj iomete miris pri klarigo rilate al la signifo de la tur-kokoj. En libro pri kristanaj simboloj mi ankaŭ trovis vian interpreton, sed ne nur. Por mi ĉiam pli grava estis, ke la koko memorigu nin al nia malforteco, kiun Jesuo tamen pardonas (Joh. 21:15-17).

En Mat. 26:34-35s

Jesuo diris al li: Vere mi diras al vi, ke en ĉi tiu nokto, antaŭ ol krios koko, vi trifoje malkonfesos min. Petro diris al li: Eĉ se mi devos morti kun vi, mi neniel vin malkonfesos.

Mi trovis ankaŭ kiel klarigon, ke la koko estu simbolo de la releviĝo, ĉar li indikas novan tagon. Se temas pri ventomontrilo mi trovis ankaŭ indikon pri la vento de Dio, kiu ĉion renovigas.

Salutas korege
Siegfried KRÜGER

Nova eldono de la Biblio



Nun eblas aĉeti la noveldonitan Bibliion. Krom la Malnova kaj Nova Testamentoj, la Biblio ankaŭ enhavas la Duakanonajn librojn, tradukitaj de Gerrit Berveling. La Biblio estas aĉetebla ĉe la eldonejo, ĉe kelkaj libroservoj, ĉe Bernhard Eichkorn kaj ĉe mi. Ankaŭ se vi vendas ĉe Bernhard, kvarono venas el la stoko de KELI. Plej favore por ni estas mendo ĉe Bernhard.

La Duakanonaj libroj

- Tobit
- Judit
- Aldonoj al Ester
- I Makabeoj
- II Makabeoj
- La saĝeco de Salomo
- La saĝeco de Jesuo, filo de Sirah
- Baruh
- Letero de Jeremia (Bar 6)
- Aldonoj al Daniel
- La preĝo de Manase

Ben- kaj bondezirante salutas korege
Siegfried KRÜGER; Claudiusweg 10; DE-74074 Heilbronn
Tel/Fax +49 (0)7131-162688,
Retadreso: slkrueger@gmx.de

Bernhard EICHKORN; Romäusring 20; DE 78050 Villingen-Schwenningen
Retadreso: bernhard.eichkorn@esperanto.de
ttt-paĝo: www.bernhard-eichkorn.de

vendas jenajn librojn:

- BIBLIO kun la Duakanonaj Libroj (vere la tuta); 1375 paĝoj.
Serio Oriento-Okcidento. KAVA-PECH, CZ Dobřichovice, 2006, 19,80 € + sendokostoj (tri aŭ pli ekz. po 13,20 €)
- ADORU, la ekumena preĝ- kaj kantlibro en Esperanto. 1478 paĝoj, 2001, 19,80 € + afranko (tri aŭ pli ekz. po 13,20 €)
- kaj la Mini-KD kun la melodioj de ADORU, la tekstoj de la BIBLIO (germana kaj esperanta), la Mes-libro, kaj aliaĵoj: 5 € + sendokostoj (posedantoj de ADORU pagas 3 €)
- Esperante kaj Ekumene; Festlibro por la 75-a naskiĝtago de Adolf Burkhardt, en Esperanto, 368 paĝoj, Eldonejo Iltis, 2004, 30 € + afranko (tri aŭ pli ekz. po 20 €)



Elsbeth Walder

16-08-1919 – 16-11-2006

La 16an de novembro 2006 mortis nia kara patrino Elsbeth Walder en la aĝo de 87 jaroj. Jam dum kelkaj jaroj ŝi suferis pri mensaj kaj korpaj malsanoj.

Dum la pasinta jaro ŝi ricevis vizitojn de karaj KELI-amikinoj de Hungario kaj Bulgario.

La kontakto kun la KELI movado ege riĉigis kaj ĝojigis ŝian vivon!

Nia patrino ege mankas al ni sed ni certas, ke ŝi nun troviĝas en la manoj de Dio!

Ni kore salutas ĉiujn!

Ruth van Puijenbroek
Monika Schaer- Walder
Verena Chaves- Walder

Oldřich Antoš



La 3-an de novembro 2006 mortis en Děčín, frato Oldřich Antoš, en la aĝo de 73 jaroj. Li estis profesie fervojisto kaj li aktivis ne nur en la Esperanto-movado, sed ankaŭ en la Fratara eklezio. Nehavante proprajn infanojn li adoptis kaj edukis du romaajn knabojn. Li ofte vojaĝis kaj partoprenis kelkajn KELI-kongresojn.

Amike
Pavel Polnický



Ŝalom'

SÖREN JANSON
Arr.: Lennart Jerneströnd

Kviete

Ŝa -- lom, ŝa -- lom -- | Jen pa -- con ai vi -- |

Ŝa - lom, ŝa - lom -- | Ne laŭmonda estas mi - a pac'.

*) ANALYS / D-DUR

Esperantigis Åke Ahlén. Represo kun afabla permeso. Sören Janson, kiu 1933 naskiĝis, estas depost junaj jaroj handikapita. Li estas kaj muzikisto kaj artisto. La jenan kanteton la publikiĝis la unuan fojon proksimume 1970.